

gaja haveno 37

Porto Alegre, RS, Brazilo | Junio-Julio 2017 | Kreita en 1997

▲Kelk- linie pri

La signoverboj - Ŝafo: Mi volas!, Taŭro: Mi havas!, Ĝemeloj: Mi pensas! Kankro: Mi sentas! Leono: Mi estas! Virgo: Mi analizas! Pesilo: Mi amas! Skorpio: Mi kontrolas! Sagitário: Mi observas! Kaprikornio: Mi povas! Amforo: Mi scias! Fiŝoj: Mi kredas!

Opinieto - Iam gravulo malafable diris al Mário Quintana: "Mi tre ŝatis viajn versetojn", al kio Quintana replikis: "Dankon pro via opinieto."



Skolopendro
- Mafalda, la edzino de Erico Veríssimo, kutimis regali

Mário-n Quintana-n per tiom multe da ŝtrumpetoj, ke li plendis: "Ŝi ŝajne trovas, ke mi estas skolopendro."


Bestetvivoj - Formikoj povas vivi dum 5-7 jaroj. Tervermoj, inter 4 kaj 8 jaroj. Hejma blasto povas havi ĝis 20 mil idojn!

Spermatozoidoj - En unu sekundo, la genera aparato de la viro produktas 1.400 spermatozoidojn.

Alvenjaroj - La hispanoj alvenis al Rio Grande do Sul en 1626; la bandejrantoj, en 1636; la afrikanoj (kiel sklavo), en 1725; la germanoj, em 1824 kaj la italoj, en 1875. ●

▲Matilda

He, Miguel, ĉu la asteroidoj Zamenhof kaj Esperanto estus eventuale danĝeraj al la Tero?...



▲Onidire

En tiu novliberala socio kiu spiras iun globokoloniantan kulturon konsumistan, la vera kulturo estas anstataŭita de la amuziĝo. Oni klopodas formi konsumantojn kaj ne civitanojn. Malpli da racio kaj pli da emocio. Kulturo estas ĉio kio humanigas nian spiriton kaj nian konsciencon. Nu bone, kiel la sistemo multobligos siajn profitojn se la homoj havos kritikan sencion kaj spiritalan rafinon?

Frei Betto

Mi adoras la homaron. Tio kion mi ne eltenas estas la homoj.

Charles Schultz

Mi ĉiam imagis, ke la paradizo estas speco de librovendejo.

Jorge Luis Borges ●

▲Mozaiko

> César Dorneles

Mi legis raportaĵon, en la maja numero de la revuo *Piauí*, pri la degelo en Gronlando, en kiu vivas nur ĉ. 60 mil homoj. Preskaŭ triono el ili loĝas en Nuuk ("La Duoninsulo" en la gronlanda lingvo), fondita komence de la 18a jc de Hans Hegede, iu norveg-dana misiisto. Kurioze kiam li alvenis al la granda insulo, li eltrovis, ke ne ekzistis vorto por "pano" en la lingvo de la indiĝenoj ĝuste pro tio, ke ili ne sin nutris pere de ĝi. Sekve kiam Hegede pensis traduki en la gronlandan lingvon la "Patron Nian", la plej konatan preĝon de la kristanismo, unu el la versoj fariĝis tiel: "Nian fokon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ".

Jen bela novaĵo por la gaŭĉa E-Movado: denove oni povos kalkuli je la realigo de nia Gaŭĉa Esperanto-Renkontiĝo. Ties 12a aranĝo estas programita al la 11a k 12a de novembro en aŭditorio de la Leĝofara Domo. Mi ĝojas pri la novaĵo ĉar fine nedubbele esperantrenkontiĝoj ĉiam havas grandan utilon por la Movado. Danke al ili oni povas arigi la homojn en kunfratiĝa kaj fruktodona okazo kaj eĉ stimuli tiujn kiuj eventuale jam de longa tempo ne partoprenas en iu ajn aktiveco rilata al E-o alproksimiĝi denove de la movada vivo, refortigante siajn ligojn kun ĝi. Mia opinie tute ne gravas la kvanto da homoj partoprenantaj. Nur 20, 30 40? Plej gravas ĝia realigo en si mem. ●

gaja haveno

Sendependa
Esperantogazeteto
Kreita en Julio 1997
Redaktas
César Dorneles Soares
Porto Alegre, RS, Brazilo
dornelespoa@gmail.com

▲ Profilo

Miguel Rocha Bento, 19-jara, studento pri Fiziko, E-isto ekde 2015 kaj instruanto de baza kurso ĉe Gaúcha E-Asocio, estas la intervjuato de ĉi tiu eldono de GH

Kia estas via nova sperto kiel E-instruanto? Ĝi estas ja defia, ĉar tute ne estas sufiĉe koni la lingvon por instrui ĝin: oni ankaŭ bezonas pripensi la plej bonajn manierojn klarigi la konceptojn al la gelernantoj, ade revidante studitaĵojn kaj sen tro paroli pri gramatikaĵoj. Ĝi estas ankaŭ rekompencanta simple pro tio, ke la ebleco kunhavigi mian ŝaton pri Esperanto kaj disvastigi la lingvon ege feliĉigas min. Estas inde diri, fine, ke temas pri mia unua sperto instruante ion ajn: ĝi estos utila kiam mi iĝos instruisto pri Fiziko (tio baldaŭ okazos, post la fino de mia licencia kurso ĉe la universitato).

lu libro: La Lingva Defio (El ĥaoso al sana prudento), verkita de Claude Piron

lu filmo: The Untouchables (La Netuŝebluloj)

lu muzikaĵo: Ne estas eble por mi elekti nur unu muzikaĵon kiel la plej bonan! Sed hodiaŭ mi rekomendas la muzikaĵon "Atraso Verdade", farita de la muzikgrupo "Funkalister".

lu TV-programero: Show do Milhão (Spektaklo de l'Miliono)

lu kantist(in)o aŭ bando: Camel



lu aktor(in)o: Ricardo Darín
lu verkist(in)o: Roberto de Andrade Martins, brazila historiisto kaj filozofo pri scienco

lu talento kiun vi ŝatus havi: Bone ludi futbalon!

lu famulo/historia figuro kiun vi admiras: Henri Poincaré

lu afero kiu dolĉigas la vivon: La maloftaj mallongaj vivoj ĉe la universitata restoracio

Se vi havus pli da tempo: mi legus pli da libroj, ĉefe verkoj en Esperanto.

lu revo: Estonte, altnivele traduki en Esperanton malnovajn kaj historie gravajn sciencajn eseojn, traktaĵojn ktp.

lu hobbio: Ludi okarinon

lu loko kiun vi dezirus koni: Butano, malgranda reĝlando en Himalajo

lu donaco kiun plaĉas al vi gajni: Libroj

Vi estas... juna idealisto! ●

▲ Iu poemo



Ne estas paco
sen amo
Ne estas dormo
sen sonĝoj
pri amo -
Ĉu freneza, ĉu malvarma
obsedata pri anĝeloj
aŭ maŝinoj,
la fina deziro
estas la amo.

> Allan Ginsberg (1926-1997),
usona poeto

▲ Pri-lingve



Ĝusta = precize konforma al regulo, leĝo, destinitico, cirkonstancoj, al la intencata celo: "ĝusta metodo", "ĝusta frazo", "ĝusta homo por io"...

Korekta = rilata al korekt(ad)o: "korekta aktiveco (de ekzamenoj...), korekta domo (estabejo, en kiu oni provas korekti k plibonigi junajn deliktulojn) (PIV)

Imago = kapablo imagi: "la realo superas ofte la imagon".

Bildo = videbla aspekto de objekto, sceno, multfoje reproduktita per desegno, pentrado, skulptado, fotado, filmado ks: "li skulptis grandan lignan bildon".

Humoro = Kutima aŭ okaza stato de la temperamento aŭ de la psiko: "bona/melankolia humoro"

Humuro = Originala sentomaniero k esprimprocedo (...) kiu prezentas la komikaĵojn kun seriozeco k la absurdaĵojn kun respekta soleneco. (PIV): "la humuro de Millôr Fernandes".

Krokodili = paroli sian nacian lingvon en esperantista medio.

Aligatori = paroli en la nacia lingvo de iu alia, estante en esperantista medio.

Kajmani = paroli en nacia lingvo stranga ĉu por la parolanto ĉu por la aŭskultanto ●